

Klara Velmer portis belgustan someran robon kun koloro de salmo. Sur piedoj ŝi havis sandalojn, kompreneble sen ŝtrumpoj. Sur la grandaj mamoj la vesto videble streĉiĝis. La blonda hararo kvazaŭ lumigis en la duonlumo. "Ĝis nun ŝi eĉ ne pensis, ke ŝi devus vesti funebran robon", - pensis subite Lina.

- Li estas frenezulo, - diris Nicolle dramvoĉe. - Li kaŝis sin ie en la domo kaj volas mortigi nin ĉiujn!

Paul kaj Klara provis sin trankviligi per mallaŭtaj vortoj. Dume Trebs malfermis la pordon kaj permesis eniri Tomar, la ĝardeniston. La viro estis tia sama, kia estis matene. Ega barbo kovris lian vizaĝon, li malcerte ĉirkaŭrigardis. La nigregaj okuloj memorigis ilin al Hindujo, kune kun lia bruna haŭto. La ĝardenisto videble fartis malbone, fremde en tiu ĉi societo. Eble li ankoraŭ neniam estis tiel proksime al ili, fizike. Koller pensis, ke jen, la du murdoj pleje ŝanĝas la vivon de tiu simplulo, ĉar la saman tagon jam duan fojon li venas en la vilaon, kie antaŭe dum jaroj ne trapaŝis la sojlon.

La nazo de la serĝento maltrankvile moviĝetis, kiel tiu de leporo. Laodoro de ajlo...

Paul Rotten kiel heroo, antaŭenpaŝis:

- Mi pensas, ke antaŭ ĉio suspektendaj estas la viroj. Do, ŝajne plej bone, se mi mem rakontos al vi: kiam oni mortigis sinjoron Reet, mi estis en la domo, tamen aliflanke de ĝi. En la garaĝo mi kontrolis mian aŭton. Se oni finfine forigos tiun ĉi... blokadon, mi foriros eĉ ne retrorigardante. Mi jam sentas eĉ troan enuigon pro tiu ĉi domo.